

John Ellerton,

Forpasis tiu tag',  
Sinjoro

*tradukita de Frieder Weigold*

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,  
Kaj profundigas la senlum'.  
Vi gardis nin de ajn doloro.  
Nin gardu ankaŭ dum nok-  
tum'!

2. Ni rotacias en la tagon.  
En nokta paco dormas ni.  
Kaj portas lumon trans la  
maro  
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno  
Briladas super tera rond',  
Eksonas laŭdo pro la beno  
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,  
Ja brilas en plu fora land'!  
La gloron, kiun ni admiris,  
Anoncas plu preĝada kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!  
Kaj sole staras via tron',  
Ke sole via regno restu  
Je fina tag' sub unu kron'.

...

John Ellerton,

Du lässt den Tag, o  
Gott, nun enden

*tradukita de Raymund Weber*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas  
barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

John Ellerton,

Ni estis ja en mano  
Dia

*tradukita de Manfredo Ratis-  
lavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,  
dum brilis super ni la Sun'.  
Protektu nin per mano Via  
dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno  
de l' nova tag', ripozas ni  
dum tiu nokt' en Via beno<sup>2</sup>  
ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' for-  
dronas  
la Sun' en tiu ĉi vesper',  
multvoĉe Via laŭdo sonas  
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta  
la Teron lumo de l' maten',  
senĉese estas plusonanta  
preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉiopova,  
senlima Via regno, nin  
konduku al la tago nova  
en Via regno je la fin'!

...

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymond Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland "Gotteslob", in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Musiknoten findet sich auch auf der Heimseite [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)